



INFORMILO PRI ETNAJ PROBLEMOJ

Etnismo

N-ro 115 - 30.06.2025

DUBSENCA OFICIALA
DULINGVISMO
EN KANADO

INTERRETA PLATFORMO
POR KONIGI LA SVIS-
ROMANDAJN DIALEKTOJN

ĜENERALA ASEMBLEO
DE IKEL EN BRNO

**Ne facilas
revivigi
la irlandan
lingvon**



Etnismo

N-ro 115 - 30.06.2025



Foto de la kovrilo: Tyson Smith

Eldonista letero

► Fino de estrara periodo **3**

Letero de leganto

3

Ne facilas revivigi la irlandan lingvon

4

Dubsenca oficiala dulingvismo en Kanado

8

Interreta platformo por konigi la svisromandajn dialektojn aŭ: kiel kunlabori en la diverseco?

12

Koncize el...

16

IKEL-informilo n-ro 93

- Ĝenerala Asembleo de Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj en Brno, la 1an de aŭgusto de 2025 **17**
- Adiaŭaj vortoj de la redaktoro **18**
- Salutvortoj de la nova prezidanto **19**

La membroj de la **Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL)** ricevas **Etnismo**-nsenkrompago, minimume 36 paĝojn jare. Unuopa ekzemplero de simpla numero kostas 5 €. Ĉiuj eroj de la «**IKEL-Informilo**» estas oficialaĵoj. La aŭtoroj ne ricevas honorarion. La redaktoro rezervas al si la rajton ne publikigi, mallongigi kaj lingve korekti la kontribuojn.

La artikoloj publikigitaj en **Etnismo** ne nepre esprimas starpunkton de **IKEL**, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Eblas reklami en Etnismo!

- **Anonctarifo:** (EUR): 1 p. 80, 1/2 p. 45, 1/4 p. 25, 1/6 p. 15.
- Rabato por IKEL-membroj: 10 %.

Estraro:

- **Prezidanto:** **Rafael BLANCO ARBE** (nafarano-Eŭskio), Sol 2, 31490 Kaseda. Hispanio
retadreso: rblancoarbe@gmail.com
- **Vicprezidanto kaj redaktisto:** **Nicole MARGOT** (vaŭdanino), ch. des Lys 4, CH-1010 Lausanne
tel: + 41 21 653 14 67, retadreso: n.margot@bluewin.ch
- **Grafiko:** **Ferriol MACIP i BONET** (kataluno)
Carrer de la Font Florida, 86, 1r 1a, 08004 Barcelona
Tel: +34 625 469 373, retadreso: farri@mac.com
- **Sekretario:** **Nikolas XIL CARVALHO** (asturleono), Zuberoa Auzunea 4-1.D- ES-20400 Tolosa. Gipuzkoa. Euskal Herria/Eŭskio
tel: ++ 34 630 44 68 63, retadreso: fokomelo-makolji@protonmail.com
- **Kasisto:** **Xabier RICO ITURRIOTZ** (eŭsko), Manuel Iradier, 22-1-ezk. ES-01005 Gasteiz, Euskal Herria-Eŭskio, retadreso: xabirico@outlook.com
- **Rilatoj kun esperanto-gazetoj. Reviziado:** **István ERTL** (hungaro), 22, rue Fautelfiels, LU-7355 Helmdange, Luksemburgio, tel. ++ 352 2633-2659, retadreso: istvan.ertl@gmail.com
- **Kunrevizianto:** **Nancy FONTANNAZ**
- **Sociaj retoj:** **Aleksandr BLINOV** (ĉuvaŝo)
- **Retejo:** www.etnismo.org
- **Forumo:** etnismo@googlegroups.com

Kotizoj kaj kontoj:

Kotizo	eŭroj
Normala	20.00
Subtenanta	30.00
Rabatita	10.00

La rabatitan membrecon rajtas ĝui ĉiu persono, kiu aŭ loĝas en (eks) socialisma aŭ «tria-monda» lando, aŭ estas studento aŭ emerito.

Pere de UEA

- a) Se vi havas konton ĉe UEA
UEA (kodo: ikel-y):
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
(Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam)
- b) Transpago al la bankkonto de UEA (Tiukaze aldonu 5% al la kotizo):
ING Bank, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64
BIC/SWIFT: INGBNL2A

Ĉiukaze indiku "ikel-y" kaj la celatan jaron. Bonvolu nepre certigi, ke via kompleta kotizo alvenas al la IKEL-konto: IKEL absolute ne povas transpreni kiajn ajn banko- aŭ peradkostojn!

Pere de la kasisto de IKEL

- Pago per **Paypal** konto al **Xabier Rico Iturriotz**,
retpoŝto : xabirico@outlook.com
- Vi povas ankaŭ ĝiri vian kotizon al la persona konto de la kasisto de IKEL. Se vi volus tiel agi, sendu retpoŝton al la kasisto.
- Pere de jenaj aplikoj al la poŝtelefono de la kasisto: +34655727215
 - ✓ VERSE ekde pluraj landoj de la EU kaj ekde Britio (konsultu ĉe www.verse.me)
 - ✓ BIZUM ekde Hispanio, Eŭskio kaj Katalunio

Perantoj

- Katalunio, Eŭskio, Hispanio: Sandra Vives: sandra@esperanto.cat
- Francio: Alain Favre, Damo de Vi, 171 allée du Quart d'Amot, FR-74140 CHENS/LÉMAN afavre1@hotmail.com (vi povas sendi ĉekojn).
- Norvegio : oficejo@esperanto.no

Venonta redaktolimdato: 30an de oktobro 2025

Fino de estrara periodo

Alain Favre

Oktobre de 2011 la tiama prezidanto de IKEL, *Daniele Vitali*, demisiis pro personaj kialoj. Kiel vicprezidanto mi decidis proponi min por alpreni tiun taskon; tio okazis en kunveno de la estraro en Barcelono, kadre de la kataluna kongreso, al kiu IKEL estis invitita.

Kion diri (preskaŭ) 14 jarojn poste? Ni unue (kaj ĉefe) vidu la pozitivajn flankojn. La revuo *Etnismo* plu ekzistas, komence mia ambicio estis daŭrigi ĝin papere ĝis la numero 100, kaj vi tenas en la manoj la numeron 115. Danke al kunlaboro de profesiulo, tiu revuo iĝis pli belaspekta, ni ricevas komplimentojn, kaj la numeroj sufiĉe bone disvendiĝas dum renkontiĝoj. Havi regule aperantan kaj "prezenteblan" revuon estas ja grava atuto por asocio; certe mi apartenas al malnova mondo, sed mi tre aprezas paperajn publikigaĵojn (eĉ en miaj sciencaj rondoj). Eble tiu opinio ŝanĝiĝos, sed entute mi ne volas sugesti ion ajn al la nova estraro, pro tio mi decidis komplete retiriĝi el la gvidaj instancoj de nia asocio.

Alia pozitivaĵo estas nia financa situacio, tute sana. Estas nuntempe sufiĉe da mono en nia kaso, por ke la nova teamo povu pli facile investi en novaj projektoj kaj plifortigi jamajn agadojn.

Kompreneble ne ĉio estas perfekta. Nia retejo estas en

stagna stato, kvankam iuj ikelanoj efike agadas en sociaj retoj, kiel vi povos legi en la protokolo de nia ĝenerala asembleo en Brno. Verdire estis problemoj dum la lastaj jaroj kun niaj retaj respondeculoj, interalie dum la kovima periodo kaj pro la situacio en iu militema lando, kiu ne ebligas facilan kunlaboron kun la eksterlando.

Restus multego por diri, sed sufiĉas. Antaŭ ol lasi la lokon mi volas danki al ĉiuj, kiuj kontribuis al la pluvivo kaj disvolviĝo de nia asocio dum tiuj lastaj 14 jaroj per verkado, reviziado, redaktado, enpaĝigo, dissendo de la revuo, librotenado, ankaŭ per prelegoj en UK aŭ aliloke, diskonigo de la asocio, kunlabo-

ro kun aliaj minoritatoj kaj esperanto-asocioj... Mi citos nenium personan nomon, estus tro longe kaj mi riskus tro multajn forgesi. Kaj mi havu la honoron omaĝi al ĉiuj niaj membroj, kiuj fidele subtenas IKEL, foje de multaj jaroj.

Mi finu per aparta danko al nia nova prezidanto, *Rafael Blanco Arbe*, kiu estas konstruanta teamon por gvidi nian asocion. "*Tins-tè a l'hèrba*" (Tenu vin al la herbo), oni diras en mia montara regiono, kaj por grimpi kaj por elteni la kontraŭajn eventojn, kiuj riskas nin faligi. Estu tio kuraĝigo, malgraŭ diversaj eblaj obstakloj kaj malfacilaĵoj, porti IKEL al pli altaj suproj. ■

Letero de leganto

Mi legis en *Etnismo* vian nekrologon pri Uwe. Tamen mi atentigas pri eraro: al Uwe kaj lia unua edzino, *Mercedes* (*Mercè* en la kataluna) el Katalunio, naskiĝis filino *Silvia* kaj filo *Marko*. a interese la gefiloj parolis Esperanton, la germanan kaj katalunan, poste lernis la kastilian. *Silvia* ĉiam respondis en la ĝusta lingvo, dum *Marko* respondis en la lingvo, kiu estis en lia menso. Ekzemple li parolis al mi en la germana, mi diris en Esperanto: «mi ne komprenas» kaj li tuj transiris al Esperanto.

Kiam la paro disiĝis, *Mercedes* revenis al Katalunio kaj post kelkaj jaroj Uwe trovis duan edzinon.

Krome vi tute ne traktis la grandan laboron kaj investon de Uwe en la organizo kaj okazigo de SUK, Someraj Universitataj Kursoj, universitataj kursoj en Esperanto en la universitato de Lieĝo (Belgio) kaj unu jaron en Antverpeno. Kiam la unua teamo (D-ro Denoël, lia filo Serge k.a.) retiriĝis, Uwe trovis alian skipon (min kaj *Léon Hauregard*), kaj ni zorge kaj efike orgnazis plurajn sesiojn. Aperis tuta serio de kajeroj de la kursoj pri lingvistiko, biologio, matematiko ktp.

Poste *San-Marino* transprenis la torĉon.

Renée Triolle, la 15an de februaro 2025

Ni tre dankas, *Renée*, pri tiu kompletigo per eventoj, kiujn ni ne konis. / NM

Ne facilas revivigi la irlandan lingvon

Alain Favre



En frua mezepoko irlandanoj ludis gravan rolon por disvastigi kaj firmigi kristanismon en Eŭropo.

La irlanda lingvo, ofte nomata gaela (ekzistas ankaŭ la skotgaela), konas sufiĉe paradoksan situacion: kvankam delonge unuarange oficiala en la irlanda respubliko, ĝi ne sukcesas eliri el la listo de la grave minacataj lingvoj. Lastatempe okazis eta pliboniĝo, tamen tio ne sufiĉas, por ke ĝia

estonteco estu sekurigita. Verdire, eĉ en Eŭropo, pluraj lingvoj kun malpli favora statuso multe pli bone fartas.

Kompreneble ne la unuan fojon ni traktas tiun temon en *Etnismo* – foje ankaŭ irlandanoj kontribuis, sed estas oportune denove trakti ĝin kaj provi meti ĝin en perspektivon tiom pli, ke priskribi specifan aliron kun ĝiaj

obstakloj por revivigi lingvon povas inspiri aliajn minoritatojn.

Jarcentoj da malestimo kaj (eĉ) persekuto

La irlanda apartenas al la kelta branĉo de la hind-eŭropaj lingvoj. Antaŭ dumil jaroj, tiuj lingvoj estis parolataj en sufiĉe granda parto de Eŭropo. Ili tamen rapide regredis, ĉefe ekde la romia

epoko, pluvivinte nur en la plej okcidenta parto de la kontinento, insula kaj duoninsula, kie ili estas nun ĉiuj forte minacataj.

Keltoj alvenis en Irlandon almenaŭ tri jarcentojn antaŭ Kristo. La insulo neniam estis konkerita de la romianoj, tamen ĝi ne estis izolita. En frua mezepoko irlandanoj ludis gravan rolon por disvastigi kaj firmigi kristanismon en Eŭropo. Kelkaj verŝajne atingis Islandon, kie ili fondis monaĥejo(j)n, sed devis fuĝi pro la alveno de skandinavo. Sed ankaŭ skandinavo atakis Irlandon iom poste, sekvante de la normandoj kaj angloj. Malrapide okazis brita konkero, kaj Henriko la oka deklaris sin reĝo de Irlando en 1541, sep jarojn post la Akto de Superreĝo (fare de la angloj, kompreneble).

De tiam la irlanda iĝis lingvo de malvenkintoj kaj postrestintoj. La situacio iĝis ankoraŭ pli malbona post la Kolonia Akto (1652) en la *Cromwell*-a periodo kaj post la irlanda malvenko en la milito de 1689-1691. En tiu momento plej multaj irlandanoj perdis sian bienon, aŭ eĉ estis deportitaj aŭ simple mortigitaj. Ekde 1695 la irlanda lingvo kaj la katolika religio (alia forta markilo de la insula identeco) estis persekutataj. Homoj el Britio, tio estas nekatolikoj kaj neirlandparolantoj, amase prenis la lokon de malaperintaj indiĝenoj. Tamen ie kaj tie aperis katolikaj neleĝaj lernejoj, ankaŭ en la kamparoj estis vojaĝantaj instruistoj, poetoj, muzikistoj kaj dancistoj, kiuj pluvivigis la lingvon kaj la kulturon.

Post la ribelo de 1798, inspirita de la franca revolucio, la Unia akto (1800) kreis la Unuiĝintan Reĝlandon de Britio kaj Irlando. La enkonduko de la terpomo komence de la 19^a jarcento ege profitis al la popolo, kiu atingis ok milionojn komence de la



Situo de Irlando

1840aj jaroj – do pli multe ol la nunaj kvin milionoj. Eĉ la lingvo pli bone fartis. Sed la alveno de melduo en 1845 malebligis pluan kultivadon de terpomoj, kaj ne ekzistis nutra alternativo: okazis *An Gorta Mór*, la Granda Malsato, kiu mortigis milionojn da homoj kaj aliajn milionojn forpelis al Britio kaj al aliaj kontinentoj, ĉefe Nord-Ameriko kaj Aŭstralio. Verŝajne temas pri la plej terura dramo en la historio de la insulo.

La enkonduko de deviga, senpaga instruado en la dua duono de la 19^a jarcento en multaj eŭropaj landoj estas plej ofte konsiderata kiel grava progreso por la popoloj, tamen en Francio kaj Britio tio implicis kompletan malpermeson de minoritataj, interalie keltaj, lingvoj.

Iom malfrua sed sukcesa nacia vekiĝo

En Eŭropo naciaj vekiĝoj okazis ĉefe meze de la 19^a jarcento; la jaro 1848 ja vidis militan pinton de tiu fenomeno. Sed en Irlan-

do tio koincidis kun periodo de terura malsato kaj malapero de multaj homoj, kiuj ĉu mortis ĉu formigris. Tamen pli poste, reage al la malpermeso de la lingvo en la publika instruado, kreiĝis Societo por protekto de la irlanda lingvo (1876) kaj Gaela ligo (1893), tiu lasta plu ekzistanta. Tiaj agadoj akompanis fortan kreskon de la nacia movado. Pli kaj pli da angligitaj intelektuloj aliĝis, komprenante la utilon uzi la irlandan, eĉ se tio estis praktike malfacila. Elstara ekzemplo de tiuj homoj estas *Roger Casement* (1864-1916), perfekte angligita intelektulo, kiu longe luktis kontraŭ ekspluatado de homoj en centra Afriko kaj Sudameriko, komprenante poste, ke ekspluatado ekzistas ankaŭ en Irlando fare de la brita imperio. Provante agi kun la germana armeo kontraŭ Britio dum la unua mondmilito por liberigi Irlandon, li estis kaptita kaj pendumita (vidula belegan historian romanon de la Nobel-premiito *Mario Vargas Llosa*, *El sueño del celta* – La sonĝo de la kelto). Jam dum la paska insurekcio de 1916 sendependeco estis



En nigra koloro: la *Gaeltachtaí* (regionoj, kiuj restis plimulte irlandlingvaj) 1956.

deklarita. Tio fiaskis sed, post politika venko en balotado, la partio *Sinn Féin* ("Ni mem", naciisma kaj respublika) siavice proklamis sendependecon en 1918.

Ja libera ŝtato, sed...

Tamen necesis dujara milito (1919-1921), por ke tiu sendepenco estu efektivigita. Ligo kun Britio restis: Irlando iĝis dominio (samstatute kiel Kanado, Aŭstralio...), sed ĝia nord-orienta parto, kun Belfasto kiel ĉefurbo, restis parto de la brita reĝlando. Temis pri la pli riĉa parto de la insulo, kie protestantoj (fakte familioj britdevenaj) nombre kaj finance superregis. Interna milito daŭris ĝis 1923, sensukcese por la "liberaj" irlandanoj, kiuj tiel ne sukcesis politike unuigi la insulon. Kaj tiu ŝtata divido restas ĝis nun.

Logike plibonigo de la situacio de la lingvo devus okazi en tiu periodo de nacia renaskiĝo. En 1922 la parlamentanoj de la Libera Ŝtato de Irlando dekretis, ke la administraj dokumentoj estu en la irlandia ekde la posta jaro, sed tio ne efektiviĝis. En 1926 Komi-

siono de la *Gaeltachtaí* (regionoj, kiuj restis plimulte irlandlingvaj) devis apogi ekonomie tiujn lokojn, sed entute la publikaj servoj devigis tiujn irlandparolantojn uzi la anglan en siaj kontaktoj kun administrantoj.

Laŭ la konstitucio de 1937, la irlandia estis la unua oficiala lingvo de la lando, sed fakte ankaŭ la angla povis esti uzata samcele, kio nuligis la bezonon uzi la irlandan, ankaŭ en la *Gaeltachtaí*. Malgraŭ la devigo instrui la irlandan en ĉiuj lernejoj ĝis la abiturienta nivelo (1934), la regreso de la lingvo daŭris. Tiu instruado okazis pere de metodoj malnovaj kaj neefikaj, fare de malbone trejnitaj profesioj. Elmigrado daŭris en la malriĉaj irlandlingvaj regionoj, kiuj iom post iom ŝrumpis. Preskaŭ ĉiuj situas je la okcidenta marbordo, kun kelkaj disaj punktoj pli interne. Kaj eĉ en la *Gaeltachtaí* oni facile povas imagi, kiu estas la familia lingvo, kiam ĉe la gepatroj nur unu estas irlandparolanto.

Malbone instruata, malfacile trovanta normon – tamen provoj de reformoj okazis en la jaroj 1940 kaj 1950, sed longe sen vera influo sur la parolantojn –, apenaŭ uzata en la amaskomunikiloj, la irlandia povis aspekti kiel nura folklorajo iel ekstera al la socia kaj ekonomia vivo de la lando.

Post provoj pli kaj pli emancipiĝi politike de Britio, Irlando fine forlasis la Britan Regnaron (*Commonwealth*) en 1949 kaj tiel iĝis plene sendependa respubliko (*Éire* en la gaela). La oficiala lingva aranĝo entute restis la sama, kio kompreneble plu fortikigis la rolon de la angla.

... Malfacila reviviĝo

Fine de la sesdekaj kaj komence de la sepdekaj jaroj de la dudeka jarcento en tuta Eŭropo naskiĝis movadoj emaj al la liberiĝo de

diverstipaj minoritataj grupoj, interalie junularaj, seksaj kaj etnaj (eĉ *Etnismo* kaj IKEL estas rezultoj de tia agado!).

Grava paŝo en Irlando estis la kreo en 1972 de la lernejoj *Gaelscoileanna*, en kiuj ĉiuj studobjektoj estas instruataj en la gaela, krom la aliaj lingvoj. Ili plu ekzistas, kun bona sukceso kaj prestiĝo. En la sama jardeko estis akceptitaj leĝoj kaj dispozicioj por favori la gaelan kaj la disvolviĝon ekonomian kaj kulturen de la *Gaeltachtaí*. En tiu epoko Irlando ankaŭ fariĝis membro de la tiam Eŭropa Ekonomia Komunumo, kio malfermis interesajn perspektivojn. En 1978 estis kreita *Bord na Gaeilge* cele al publika subteno de la lingvo en diversaj fakoj.

En la jaroj 1990-aj Irlando ege progresis ekonomie, ĝi iĝis la tiel nomata "kelta tigo". Tio helpis al la lingvo kaj kulturo, igante ilin pli videblaj ankaŭ eksterlande. Aŭdvid-amaskomunikiloj estis kreitaj, interalie en 1996 la publika televidkanalo *Teilifís na Gaeilge* (ekde 1999 TG4), kiu eĉ pli disvolviĝis poste kun korporacia statuto. En 1994 la unua eldono de la dulingva vortaro kun prononco *Foclóir Scoile* estis publikigita. Tuj post la interkonsento de Belfasto en Norda Irlando, kiu markis la finon de la milita stato en tiu parto de la insulo (1998), la translima *Foras na Gaeilge* (Instituto de la irlandia) zorgas ekde 1999 pri la subteno al la lingvo en la tuta insulo: ĝi okupiĝas pri eldonado, terminologio, edukado, organizo de eventoj, financaj rilatoj..., surprenante kaj pliigante la taskojn de la jam citita *Bord na Gaeilge*, kiu kompreneble agis nur en la respublika parto. Jen bela kunlaboro – ni precizigu, ke en Nord-Irlando la gaela estas agnoskita kadre de la Eŭropa Ĉarto de la regionaj kaj minoritataj lingvoj.


Atingoj en la nuna jarcento

En 2003 “leĝo pri la oficiala lingvo” plifortigis la irlandan en la publika sektoro en la lando kaj ankaŭ eksterlande, kun la kreo de la posteno de lingva komisaro; interalie lingvaj esploroj kaj terminologio iĝis subtenataj, same kiel instruado de la irlanda en diversaj fremdaj universitatoj.

En 2010 la “dudekjara strategio por la irlanda (2010-2030)” enhavis 13 celojn, inter kiuj la rajton uzi la irlandan en administraciaj rilatoj, la efektivigon de deviga instruado de la lingvo ĝis la abiturientigo, helpon al la *Gaelscoileanna*, uzon de la lingvo en infangardenoj, pli fortan subtenon al *Foras na Gaeilge*, plifortigon de la rolo de la gaela en la eŭropaj instancoj. En 2022 la irlanda iĝis plenrajta lingvo en Eŭropa Unio, egalnivele kun 24 aliaj.

Estis bone konstrui veran strategion kun precizaj kaj kontroleblaj celoj. Unu el la kialoj de tiu agado estis superi la momentojn de krizoj, dum kiuj la subteno al la lingvo riskas esti flankenmetita. Tamen tio estis nur bela intenco kaj ekzemple la buĝeto de *Foras na Gaeilge* ĵus estis malpliigita komence de tiu ĉi jaro, malgraŭ fortaj protestoj.

Ĉu oni jam povas mezuri pozitivajn rezultojn de tiu agado? Ŝajnas, ke jes. En 2022 preskaŭ 40% de la irlandanoj (1 873 997) diris, ke ili pli malpli kapablas paroli la lingvon, kio reprezentas kreskon je pli ol cent mil kompare al 2011 (1 761 420, apenaŭ 38,5 % laŭ niaj kalkuloj). Sed tre malmultaj homoj uzas la irlandan kiel ĉefan lingvon (4 164 en 2022, tio estas tamen 1805 pli ol en 2011). Laŭ tiu ritmo necesos multegaj jaroj por alveni al iaspeca ekvilibro inter la irlandaj kaj la anglaj.



Konklude: la irlanda estas ĉefe lingvo de lernejo kaj de elito. Ĉu la konkurenco de la plej potenca lingvo en la mondo estas aparte danĝera? Fakte jes kaj ne. Kompreneble multe pli facilas vivi en la angla. Aliflanke, jam koni la plej uzatan lingvon sur la planedo lasas lokon al alia. Ekzemple bretono (se preni alian keltan ekzemplon) devige devas scii la francan kaj, en nia “tutmondiganta” mondo kaj aparte usonigita Eŭropa Unio, devas lerni ankaŭ la anglan. Tio postulas entute pli grandan strebon.

Sed, kiel estas por multaj minoritataj lingvoj, la komunika flanko cedas grandparte la lokon al la identeca. Irlando sen la irlandaj lingvo iel perdus grandan parton de sia ekzistokialo, de sia allogo, kaj ekzistas eĉ rilatoj inter identeco kaj ekonomio. Tion komprenis politikistoj, kiuj batalis, por ke la irlandaj estu unu el la lingvoj de la Eŭropa Unio. Kaj tio siavice plifortikigas kaj pravigas la bezonon por irlandano koni kaj uzi la propran lingvon.

Sed ĉu tiu politika volo estas kohera kaj konstanta? Ni jam

vidis, ke la subteno al la lingvo tro ofte restas variabla de adaptiĝo, malgraŭ dispozicioj provi eviti tion. Ankaŭ temas pri individua decido: la rekonkero de la lingvo baziĝas grandparte sur interhomaj rilatoj tujaj, interalie en komercoj, entreprenoj, asocioj. Kaj en tiuj medioj la uzo de la angla estas delonge enradikigita. Adopti alian kodon povas aspekti socia malrespekto, malutila perdo de tempo kaj de energio, iuj iloj ĉu mankas ĉu ne estas sufiĉe konataj. Ja nova, iom revolucia sinteno estas bezonata, sed la pezo de la “realo” povas tre ofte ŝajni malfacile superbla. Certe la uzo de plej novaj lingvaj teknikoj interalie pri tradukado, memlernado kaj fakaj leksikoj konsistigas grandan parton de la praktika solvo al la realigo de tiu sonĝo de multaj keltoj, kiu tamen ankoraŭ ne kondukis al plena vekigo. ■

Elcento da irlandparolantoj en Norda Irlando laŭ censo de 2011.

Noto: ĉi tiu artikolo estis parte inspirita de tre bona kontribuaĵo, kiu aperis en la junia numero de la elstara monata revuo *Le peuple breton / Pobl vreizh* (La bretona popolo); tute ne temas pri traduko. Kompreneble ankaŭ irlandaj fontoj estis konsultitaj.

Dubsenca oficiala dulingvismo en Kanado

Renée Triolle kaj Nicole Margot

El artikolo de *Le Monde Diplomatique*, Philippe Descamps, marto 2025 kaj aliaj fontoj, ĉefe el Vikipedio



Je la promulgo de la leĝo la anglaparlantoj duoble plimultis kaj, donante al la du lingvoj egalan juran statuson, la leĝo kreis "konkurencan dulingvismon", kiu favoris la uzon de la angla.

En 2023, antaŭ sia lastjara demisio, la ĉefministro de Kanado, *Justin Trudeau* ricevis konsentan respondon de la parlamento por aktualigi la leĝon pri la oficialaj lingvoj elpensitan de lia patro, *Pierre Elliott Trudeau*, ĉefministro inter 1968-1979 kaj 1980-1984. Per tiu leĝo *Pierre Elliott Trudeau* tiam volis konstruisti la sen-

dependigemon de la kebekianoj, donante al la franca lingvo pli da rajtoj. Sed la rekono de individuaj lingvaj rajtoj, sen klara teritoria kadro, enkondukis malsimetrion inter la angla kaj la franca, lingvo plu minacata de malfortiĝo.

Iom da historio

Necesas iom da historio por kompreni la ambiguecon de la oficiala dulingvismo en Kanado. La

konstitucia leĝo de 1867 ebligis iun dulingvismon nur en la parlatamentejo kaj en la juraj instancoj. Ĉar tiu leĝo ne sufiĉis, en 1963 *Lester B. Pearson*, ĉefministro antaŭ *Pierre Elliott Trudeau*, startigis la komisionon *Laurendeau-Dunton*, kiu realigis konsiderindan socilingvistikan kaj ekonomian analizon, kies rezultoj estis publikigitaj inter 1967 kaj 1970. El tiuj raportoj oni ekzemple malkovris, ke nur 9% de la publi-

kaj funkcioj de la Federacia Ŝtato estas okupataj de franclingvanoj, kvankam ili formis pli ol kvaronon de la loĝantoj kaj plej multaj el ili laboris uzante la anglan. La raportoj de la Komisiono ege influis la lingvan politikon kaj la rolon de Kebekio ene de Kanado, ĝi starigis la bazojn pri egaleco inter la du oficialaj lingvoj. Ĝi klare rifuzis uzi la terminon “etno”, ĉar laŭ ĝi leĝaro bazita sur etna origino kontraŭstaras la principon de homa egaleco antaŭ la leĝo. Ĝi opiniis nerealisma la principon pri teritorieco de la lingvoj, kvankam sukcesan en Belgio kaj Svisio, sed rekomendis nur kreon de “dulingvaj distriktoj” kun administraj kaj juĝejaj servoj en ambaŭ lingvoj por regionoj, kie la parolantoj de iu oficiala minoritata lingvo superas 10%. Dudek kvar tiaj dulingvaj distriktoj estis kreitaj ekzemple en Kebekio, por la anglalingva minoritato, kaj tridek por la franclingva minoritato ekster Kebekio. Laŭ la Komisiono, dulingveco de ŝtato postulas ne, ke ĉiu estu dulingva, sed ke la ĉefaj institucioj, publikaj aŭ privataj, proponu servojn en ambaŭ lingvoj. La principo de egaleco proponita de la Komisiono estas egaleco ne nur de la du popoloj, kiuj fondis la Konfederacion, sed ankaŭ de la lingvoj kaj kulturoj, ne nur jura egaleco, kiel proponite poste de *Pierre Elliott Trudeau*. Tiu principo de egaleco estis la kerna ideo de la Komisiono.

Ĉefministro ekde 1968, post *Lester B. Pearson*, *Pierre Elliott Trudeau*, akceptigis en 1969 la unuan Leĝon pri la Lingvoj Oficialaj (LLO), kiu oficialigis la francan kaj la anglan en Kanado. la leĝo enkondukis ekzemple la rajton ricevi servojn de la federaciaj ministerioj, de la ŝtataj societoj kaj de la tribunaloj en la elektita oficiala lingvo, la devon por la parlamento publikigi leĝojn kaj regularojn en ambaŭ lingvoj kun



la sama jura validi, la saman statuson por la franca kaj la angla kiel laborlingvoj en la publika funkcio de la federacia ŝtato kaj en la dulingvaj regionoj. Sed *Trudeau* ne akceptis ĉiujn proponojn de la komisiono *Laurendeau-Dunton*, li forte kontraŭstaris la ideon de “franclingva komunumo” kaj de aparta statuso por Kebekio; kaj la kebekianoj plendis interalie, ke la unulingva majoritato de Kebekio daŭre estis ekskludita el la federaciaj postenoj, ĉar dulingvaj.

En 1982, post la “rehejmiĝo de la Kanada Konstitucio” el la Brita Reĝlando, kiu ebligis al Kanado mem modifi sian konstitucion, la Kanada Ĉarto de Rajtoj kaj Liberecoj, kun ĉapitro pri lingvaj rajtoj, eniris la konstitucion. La leĝo de 1969 (kun 39 artikoloj) estis nuligita en 1988 kaj anstataŭita de nova leĝo (kun 110 artikoloj). Necesis aktualigi la leĝon; la nova leĝo enkondukis kreon de komisariato pri la oficialaj lingvoj; ĝi efektive pli subtenis la anglalingvan minoritaton en Kebekio kaj la franclingvan en la cetera lando.

La leĝo estis plurfoje aktualigita. *Diom Roméo Saganash*, deputito el la kria¹ popolo inter 2011 kaj 2019, plurfoje proponis, ke ankaŭ la aŭtoktonaj lingvoj fariĝu oficialaj.

Kaj nun?

Pli ol 50 jarojn post la akcepto de la LLO oni povas konstati, ke la leĝo ja donis oficialan statuson al la franca, kio estas bonvena jura antaŭeniro. Hodiaŭ la franca havas pli da parolantoj en Norda Ameriko ol iam ajn, sed ĝia relativa pezo malkreskas. La leĝo ne sukcesis atingigi veran egalecon inter la uzo de la franca kaj de la angla. Je la promulgo de la leĝo la anglaparlantoj duoble plimultis kaj, donante al la du lingvoj egalan juran statuson, la leĝo kreis “konkurencon dulingvismon”, kiu favoris la uzon de la angla. La Komisiono *Laurendeau-Dunton* avertis: «Dulingva ŝtato ekzistas ne por disvastigi individuan dulingvismon, ĉar se ĉiu iĝus

Lingva mapo de Kanado (2008):
1 angla.
2 angla kaj franca.
3 franca.

1. nordamerika etno ankaŭ nomata: nehijaŭa, eejua aŭ eenua.



Dulingva haltsigno en la franca kaj la kria.

komplete dulingva en dulingva ŝtato, unu el la du lingvoj iĝus superflua kiel komunikilo, ĉiuj ja povante komuniki en la alia. En tiaj kazoj la superrega lingvo kreskigas propran avantaĝon kaj la alia iom post iom estingiĝas, foje dum tri generacioj.»² La Komisiono ankaŭ substrekiis, ke dulingvismo ne povas ekzisti sen sia kontraŭparto, dukulturismo. Forigi la nocion de dukulturismo signifas entombigi tiun de “fondintaj popoloj” (la anglo-lingvanoj kaj franclingvanoj kiel fondintoj de la federacia kanada ŝtato), nocio malamata de *Trudeau* sed kara al la franclingvaj kanadanoj laŭ ilia kompreno de la kanada ŝtato. Por *Trudeau* la individua dulingvismo estis la ŝlosilo de “nacia unueco”; ĉefe la franclingvanoj devis fariĝi dulingvaj. LLO starigis “duoblan minoritaton” en Kanado, tio estas franclingvan minoritaton en la anglalingvaj provincoj (ekster Kebekio) kaj anglalingvan en Kebekio. Ŝajnas kontraŭdire, ke leĝo celanta egalecan dulingvismon priskribas la angle parolantojn kiel minoritaton, dum ili fakte plimultas en la ŝtato kiel tuto.

LLO ne sukcesis bremsi la progreson de la angla ekster Kebekio,

krom en kelkaj akadiaj regionoj. Laŭ la lasta popolnombrado, de 2021, 10,7 milionoj da Kanadanoj deklaris, ke ili povas konversacii en la franca; nur 7 milionoj (19% de la loĝantaro) parolis ĝin hejme kiel ĉefan lingvon, kontraŭ 25,7% en 1971. Post kresko de dulingvismo dum la dua duono de la 20a jarcento, ĝi nun stagnas: en 2021 18% de la kanadanoj deklaris, ke ili same povas konversacii en la franca kiel en la angla, tiu procento atingis nur 12,2% en 1961 kaj jam 17,7% en 2001. Dulingvismo progresas ĉefe en Kebekio, kie ĝi superas 42% ĉe la france parolantoj, dum ĝi regresas ĉe la angle parolantoj ekster Kebekio. Tiu dulingvismo praktikata ĉefe de france parolantoj, antaŭvide al ilia asimiliĝo, fragiligas ilian lingvon laŭ la principoj viditaj pli supre.

Tamen pozitiva novaĵo: la oficialigo de la franca lingvo ebligis, ke ĉirkaŭ 740 franclingvaj lernejoj, kiuj praktikas lingvo-mergan instruadon, mastrumas lernejaj aŭtonomaj komisionoj ekster Kebekio, kaj ili logas ankaŭ angle parolantojn emajn al bona instrua nivelo. 700 000 infanoj anglalingvaj aŭ alilingvaj frekventas tiujn lernejojn; rezulte al Kanado eĉ mankas franclingvaj instruistoj.

Situacio en Kebekio

Kebekio distingiĝas de aliaj provincoj, 60% da Kebekianoj opinias, ke oficiala dulingvismo estas kerno de la kanada identeco, dum 49% de la ceteraj kanadanoj diras, ke dulingvismo ekzistas nur por plezurigi minoritaton. Nur Kebekio, ĉar ĝi ediktis proprajn lingvajn leĝojn, starigante la francan kiel la unikan oficialan lingvon, sukcesis fortigi la “lingvon de *Molière*”, kaj en Kebekio dulingvismo kreskas kaj superas 42% inter la france parolantoj. Tamen eĉ en Kebekio la uzo de la franca fragiliĝas. Kun la akcepto de la Ĉarto pri la Franca Lingvo³ en 1977, Kebekio produktis leĝojn por plifortikigi la uzon de la franca, enprenante multajn elementojn ligitajn al teritorieco, malaprobante tiel la principojn sur kiuj baziĝis la LLO.

Deputito de la “Kebekia Bloko” (politika partio de Kanado, kiu defendas la interesojn de Kebekio), *Mario Beaulieu* deklaris, ke 94% de la kanada buĝeto dediĉita al la oficialaj lingvoj en Kebekio (3,4 miliardoj da kanadaj dolaroj inter 1978 kaj 2022) iris al la angle parolantaj komunumoj; tiu mono, laŭ li, respondas al strategio krediganta, ke la defendo de la franca lingvo esprimas lingvocentrismon kaj kulturalan enfermiĝemon; multaj kebekaj politikistoj opinias, ke ŝtata dulingvismo estas samtempe akiritaĵo kaj kaptilo! Deputitino en la Kebekia Nacia Asembleo kaj kunfondinto de Solidara Kebekio, s-ino *Ruba Ghazal* naskiĝis en palestina rifuĝinta familio; ŝi asertas ke la Ĉarto pri la Franca Lingvo gravis en la konstruo de ŝia kebekia identeco. Tamen por ŝi, kiu konsideras laŭ historio la kebekianojn kiel popolon sen ŝtato similan al

2. lautjournal.info/20190222/50-ans-de-loi-sur-les-langues-officielles-rien-a-celebrer-pour-le-quebec

3. eo.wikipedia.org/wiki/Ĉarto_de_la_Franca_Lingvo.

la palestinanoj, la franca estas la lingvo de la koro sed devus esti ankaŭ tiu de la pano ĉar eĉ en Kebekio oni bezonas la anglan por sia profesia vivo.

Por certigi, ke la franca estu ankaŭ lingvo de la laboro, de komunikado kaj komerco, OQLF (*Office québécois de la langue française* / Kebekia ofico de la franca lingvo)⁴, kiu celas la respekton de la Ĉarto de la Franca Lingvo, ludas kernan rolon; ĝi rapide produktas dulingvajn fakajn vortarojn, por kela ekonomiaj sektoroj disponu pri franclingvaj terminoj antaŭ ol la angla vorto enirus la cerbojn! Se tio ne estas bone farita, angla terminaro rapide regos. La famo de ĝiaj lingvaj rimedoj preterpasas la limojn de la provinco, ĉirkaŭ 7 milionoj da retumantoj, 22% el Francio, konsultis lastjare ĝiajn datumojn⁵.

Hodiaŭ 91,2% de la infanoj sekvas kursojn en la franca; en la antaŭelementa kaj elementa lernejo la instruado okazas nur en la franca, krom esceptoj por historiaj minoritatoj anglalingvaj (sed tiuokaze oni bezonas specialan permeson por eviti, ke enmigrantoj sekvu lernejojn en la angla); en la gimnazio kaj universitato oni povas elekti la anglan. En 2013 ekzistis 15 universitatoj franclingvaj kaj 3 anglalingvaj. Malgraŭ tio la elano de la franca lingvo malfortiĝis ekde la fino de la 20a jarcento; post eksterordinara fekundeco la procento de la naskoj en Kebekio ekfalas de la jaro 1960 kaj atingis nur po 1,3 idoj por virino en 2023. Tial la estonto de la franca lingvo baziĝas pli kaj plu sur la franca lingvigo de la enmigrintoj. Sed, konstatas Sinjoro *Castonguay*, emerita profesoro pri statistiko, en Kebekio la procento de la franclingvanoj inter enmigrintoj atingas apenaŭ 50%.

4. oqlf.gouv.qc.ca/office/mission.html
5. vitrinelinguistique.oqlf.gouv.qc.ca



UNITED STATES DEPARTMENT OF HOMELAND SECURITY

Du rompoj, geografiaj kaj generaciaj, pli kaj pli malkvietigas. La uzo de la franca lingvo malkreskas en la ĉefurbaj regionoj de Montrealo kaj de Otavo. Plie, grava kultura produkto de Kebekio estis la kanzono (*Felix Leclerc* aŭ *Robert Charlebois* kaj aliaj); sed la junuloj malpli ol tridek jarojn aĝaj ne plu aŭskultas francajn kanzonojn. Estas la tasko de la gazetaro, de la gepatroj kaj geavoj, redoni al la etuloj la emon al la franca kanzono, reagis *Monique Giroux*, de Radio Kanada.

Ĉu esperiga reorientiĝo?

Konsciante, ke la protekto de la franca lingvo ne plu sufiĉas, *Justin Trudeau* akceptigis en junio 2023 la leĝon C-13, celante "realan egalecon inter la oficialaj lingvoj de Kanado". Rompante kun la formaleca egaleco de la antaŭaj tekstoj, tiu leĝo rekonas la neceson de dulingvaj komunumoj, ne egalaj en la praktiko, sed kiuj povas esti traktataj malsimile. «Post longaj kontraŭstaroj, la kebekia kaj federacia registaroj sukcesis kunlabori», ĝojis la kebekia ministro pri la franca lingvo, s-ro *Jean-François Roberge*: «Nivolis samtempe subteni la minoritatajn franclingvajn

komunumojn kaj defendi la lingvan apartecon de Kebekio. Ekzistis neniuj rekono de la fakto ke la franca, eĉ plejmulta en Kebekio, estas fragila. Tio estas nun farita.» La nova teksto eksplicite referencas al la Ĉarto de la Franca Lingvo, kvankam tiu ĉarto estis antaŭe kontestita antaŭ la tribunaloj. Ĝi volas «favori la ekziston de franclingva plimulto» en Kebekio, sed ankaŭ restarigi la «demografian pezon de la franclingvaj malplimultoj ekster Kebekio» je la nivelo de 1971, tio estas 6,1% de la loĝantaro. Krom la plilarĝigo de dulingvismo en la federaciaj entreprenoj de la regionoj kun forta franclingva ĉeesto, la leĝo antaŭenigas fortan franclingvan enmigradon. Por ke tio estu efika, necesus 20% da franclingva enmigrado, 100 000 france parolantoj ĉiujare! Multas se oni komparas kun la celo de *Justin Trudeau* limigi la tutfederacian enmigradon je 500 000 jare! Sed la vivigo de la franca lingvo gravas ĉefe por Kebekio. «Kreante areojn, kie oni devigas la uzon de la minoritata lingvo, plialtigante sian socian nivelon por instigi la parolantojn de la reganta lingvo lerni la minoritatan, oni inversigas la influojn kaj restarigas lingvan justecon.» klariĝas s-ro *Benoît Dubreil*, komisaro pri la franca lingvo en Kebekio. ■

Konsciante, ke la protekto de la franca lingvo ne plu sufiĉas, *Justin Trudeau* akceptigis en junio 2023 la leĝon C-13, celante "realan egalecon inter la oficialaj lingvoj de Kanado". Rompante kun la formaleca egaleco de la antaŭaj tekstoj, tiu leĝo rekonas la neceson de dulingvaj komunumoj, ne egalaj en la praktiko, sed kiuj povas esti traktataj malsimile.

Interreta platformopor konigi la svisromandajn dialektojn aŭ: kiel kunlabori en la diverseco?

Nicole Margot



La ĉiujaraj francprovencaj festoj malfeliĉe pli koncernas folkloron ol lingvon

Ni ofte informis en ĉi tiu revuo pri la francprovenca/arpitana¹ lingvo, la regiona lingvo de la nere-kandidatiĝinta prezidinto de IKEL, *Alain Favre*, kaj de ties same nere-kandidatiĝinta vic-prezidinto kaj redaktoro, *Nicole Margot*. Vi do scias, kiom tiu

lingvo dividiĝas en multnombrajn variantojn nefacile interkompreneblajn kaj kiom malfacilas unuigi la lingvon aŭ tutsimple unuece kunlabori por ĝia pluvivo.

Malfacilas, ĉar la realo de la lingvo ekzistas preskaŭ nur en ĝiaj variantoj, en ĝiaj “*patois*” (francilingva nomo por “dialektoj”), kiel ŝatas ĝin nomi

iliaj parolantoj, ĉefe en Svislando sed ne nur. Kaj, laŭ mia propra sperto, la homoj de mia regiono interesiĝas unue pri la loka varianto, pri lokaj kulturaj radikoj; nur poste ili, foje mire, malkovras, ke la vortoj uzataj apartenas ne nur al ilia dialekto, sed ankaŭ al tiu de la najbaroj. La bariloj inter la variantoj de la arpitana estas foje zorge kultiv-

1. en 1873 la itala lingvisto *Graziado Isaia Ascoli* deklaris: «Mi nomas franc-provenca iun lingvan tipon, kiu kunigas, krom kelkaj propraj karakteroj, aliajn, kies parto komunas kun la franca lingvo (dialekto de la ojlaj lingvoj) kaj alia parto kun la provenca, kaj kiu ne venas el malfrua kuniĝo de diversaj elementoj sed, male, atestas pri propra historia sendependeco, ne tre malsimile al tiuj, per kiuj distingiĝas inter si la aliaj ĉefaj latinidaj tipoj.» Sed rapide oni ekkonsciis, ke la nomo “francprovenca”, nun skribita sen streketo, kreas konfuzon kun la provenca, dialekto de la okcitana lingvo. Iuj proponis la nomon “arpitana”, sametimologian kiel “Alpo”, kiu en la arpitana signifas “montaran paŝtejon” kaj “*arpitan*”, “montarano”. La nova termino, malpli konfuza, disvastiĝas internacie sur la reto kaj inter novaj parolantoj, sed estas forte rifuzata de la tradiciaj parolantoj. “Francprovenca” restas la oficiala termino.

ataj de la parolantoj mem, kiuj emocie ligiĝas al siaj apartecoj. La diversaj skriboj ja kontribuas al tiu dividiĝo, sed oni ekvidas provojn unuecigi la skribon, foje nur laŭ regionoj kiel en la valeza kantono, kiu posedas la plej grandan diversecon de dialektoj kun propraj skriboj. Ni jam parolis pri la superdialekta ortografio de la lingvisto *Dominique Stich*, foje imitata en palaj idoj. Ni menciis, ke en tiu skribo eĉ ekzistas tradukilo de la franca al la arpitana ĉe la automata tradukilaro *Apertium*. Nur minoritato (tamen iom kreskanta, ĉefe en Savojo, kie oni foje instruas pere de ORB) el la arpitanparolantoj uzas tiun skribon, sed la iniciatinto, *Dominique Stich*, transskribas multajn valorajn literaturajn tekstojn en la arpitanan, komforte legeblajn en ORB (Ortografio de Referenco B), kiun li nun emas nomi “literatura ortografio”. Ĉiam, laŭ mia sperto, kiu certe ne ampleksas tutan Arpitanion sed limiĝas al Romandio², malfacilas, almenaŭ en unua etapo, proponi tekstojn en tiu literatura skribo al lernantoj, kiuj jam penas alproprigi la lokajn lingvon kaj skribmanieron.

Kiel vi ankaŭ scias, la arpitana parolatas en tri ŝtatoj, Francio, Italio kaj Svislando, kaj ĝia pluvivigo certe pli efikus se la parolantoj de la tri landoj unuiĝus por defendi sian lingvon; sed tio tute ne okazas, krom kadre de la Federacio Romanda kaj Internacia de “Patois” (FRIP), en la ĉiujaraj francprovencaj festoj, kiuj malfeliĉe pli koncernas



La arpitana parolatas en tri ŝtatoj, Francio, Italio kaj Svislando, kaj ĝia pluvivigo certe pli efikus se la parolantoj de la tri landoj unuiĝus por defendi sian lingvon.

folkloron ol lingvon, kaj pere de bulteno, “*L’Ami du Patois*”, kies diversaj lingvaj variantoj kompreniĝas ĉefe per franclingvaj tradukoj.


Por resti proksima al la popola realeco de la lingvo, ni devas agi meze de tiuj dividoj, kaj en tiu malfacila kunteksto mi deziras paroli al vi pri svisa iniciato, laŭ mi esperiga.

Interkantona platformo por sentemigi (eksperto) kaj lernado de la svisromandaj dialektoj

La 7an de decembro 2018 la Federacia Svisa Konsilio rekonis, en la Eŭropa Ĉarto de la Regio-

naj Lingvoj, la francprovencan, parolitan kaj pluparolatan de malkreskiĝanta nombro en tri romandaj kantonoj, kaj la franĉkonteana, parolatan nur en la Ĵuraso Kantono. Por la arpitana, tion faris ankaŭ Italio, sed ne Francio, kiu tamen permesas la instruadon de la lingvo en la lernejoj. Tiu oficiala rekonado de la du regionaj lingvoj de Romandio devigas la ŝtaton konkretigi sian subtenon al ili. Ĉiu kantono povas do ricevi financon subtenon de la Konfederacio por iu projekto subtena al ĝia dialekto, sed la Konferenco de la Kantonaj Gedelegitoj al la Kulturaj Aferoj (*Conférence des Délégués et des Délégués cantonaux aux Affaires Culturelles, CDAC*) opinias, ke «mankas

2. Svislando estas dividita laŭ kvar lingvaj regionoj, germanlingva (alemana), franclingva, itallingva kaj romanclingva. La franclingvan oni nomas Romandio, ĝi entenas la kantonojn Ĝenevo, Vaŭdo, Valezo, Friburgo, Neŭŝatelo, Ĵuraso kaj Berno Ĵuraso. Tiu nomo venas de la nomo historie donita al niaj francprovencaj dialektoj sed eĉ pli vaste al ĉiuj gaŭlolinidaj lingvoj: la “roman”.



La Federacio Romanda kaj Internacia de "Patois" (FRIP) eldonas la bultenon "L'Ami du Patois", kie diversaj lingvaj arpitanaĵaj variantoj kompreneblas ĉefe per franclingvaj tradukoj.

hodiaŭ projekto, kiu federigas kaj kunigas la fontojn kaj fortojn ekstreme heterogenajn kaj diserigitajn de la agantoj valorigantaj la francprovencan kaj la franĉkonteanaĵon».

Tial la CDAC proponis al la Federacia Ofico pri Kulturo projekton por ilo kuniganta materialon de la diversaj romandaj dialektoj kun la celo konigi kaj instrui ilin. En 2023, sekve al tiu akcepto, la CDAC komisiis al laborgrupo konsistanta el reprezentantoj de la kulturaj servoj de Valezo, Friburgo, Vaŭdo kaj Ĵuraso, kantonoj, kie la regionaj lingvoj plu vivas, kaj al diversaj ekspertoj, interalie de la Dialektologia Fakolito de la Neŭŝatela Universitato, konkretigi la projekton. Ankaŭ parolantoj kaj respondeculoj de la kantonaj dialektoj estis invititaj partopreni la laborgrupon.

Se la projekto estis incita de politikistoj, tio estas de la kantonaj respondeculoj pri kulturo, granda loko estas lasita al la bezonoj de la dialektoparolantoj, kiuj «penas asociiĝi por unuigi siajn klopodojn valorigi la propran dialekton en la kantonoj kaj interkantone», konsentas ankaŭ Yan Greub, direktoro de la "Glossaire des patois de la Suisse romande à l'Université de Neuchâtel", fakolito de la neŭŝatela universitato, kiu verkas de dekoj da jaroj vastan

vortaron entenantan ĉiujn uzojn de la diversaj romandaj dialektoj. Li plu deklaris: «La kunordigado de la fortoj ne simplas pro la ligo al la identeco ofte tre loka de la dialektoj. Iuj parolantoj vidas la kunlaboron kiel perdon de identeco, kvankam ĉiuj rekonas la neceson kuniĝi por plu-vivigi sian lingvon. Ni precizigu, ke tiu projekto ne proponas materialon en iu regiona superdialekto sed deziras valorigi la diversecon de la romandaj dialektoj. En Svisa Romandio, efektive, la parolantoj deziras defendi nur siajn proprajn tradiciajn variantojn kaj ne la dialekton kiel abstraktan objekton aŭ varianton, kiu ne estas ilia.»

Notindas, ke la aŭtoro diris ne "la francprovenca" aŭ "la franĉkonteana" sed "la dialekto", parolante pri abstraktaĵo kuniganta ĉiujn romandajn dialektojn el la du lingvoj. En tio li ja spegulas la sintenon de ĉiuj romandaj dialektoparolantoj, kiuj ne volonte akceptas, ke iliaj dialektoj originas el iu komuna lingvo, kaj li eĉ plifortigas tiun senton ĝin ripetante. Ekzemple la ĵurasanoj rifuzas, ke sur la Platformo oni diru, ke ili parolas la franĉkonteanaĵon, sed deziras, ke oni diru la "ĵurasano", kvankam la Eŭropa Ĉarto rekonas nur lingvojn, ne dialektojn. Tiun realon la dialektoparolantoj devas akcepti, sed ili faras tion

kontraŭvole, kaj oni vidas, ke eĉ fakulo transprenas tiun senton pro la deziro respekti la lokan senton. Por la francprovenca ni povas eble klarigi tiun rifuzon aparteni al iu lingvo per la relative malfrua rekono de aparta lingvo far la lingvisto *Graziadio Isaia Ascoli*. Certe necesis tempo por ke tiu scienca rekono, en 1873, alvenu al la oreloj de la dialektoparola popolo, tute ne malfermita al lingvaj sciencoj. Tio signifas, ke la parolantoj de la francprovenca longe vivis sen la sento aparteni al iu lingvo. Antaŭ du jaroj, dum kolokvo pri la romandaj dialektoj, valeza lingvistino, denaska parolanto de valeza dialekto, asertis, ke la dialektoparolantoj ne identigas sin kun iu francprovenca lingvo kaj ke por ŝi la termino "francprovenca" nomas ne lingvon sed dialekta familion; vidpunkto ofte ripetata de dialektologoj, eĉ se oni ne povas ignori la koncepton de francprovenca lingvo.

Oni povas do konstati, ke la lingva realo de la francprovenca kaj de la franĉkonteana plenas je tabuoj kaj konservativismoj, sed verŝajne tiu konservativismo, ne tre racia, pozitive rolis en la pasintaj jarcentoj, por la pluvivigo de la francprovenca fronte al la tiama pli "racia" hegemonio de la franca lingvo.

Kiel mi asertis komence de la artikolo, ankaŭ mi forte kredas, ke la plej granda parto de la francprovenca realo estas en la lokaj variantoj, sed, ĉar mi lernis ĝin konante la ekziston de lingvo francprovenca/arpitana, mi ne havas problemon senti min parolanto de plurŝtata lingvo, eĉ se mi sentas min tre ligita al mia vaŭda varianto. Al miaj studentoj de la lingvo, mi provas malfermi la rigardon al la tuteco de la lingvo, transskribante ekzemple tekston en la friburga (varianto aparte proksima al la vaŭda sed kun malsimila skribo) en la vaŭdan skribon, kaj ni devis konstati, ke preskaŭ ĉiuj vortoj ekzistas en ambaŭ variantoj, nur la uzo de tiuj vortoj foje diferencas kaj la diversaj prononcmankoj kaŝas la similecon. La Interkantona platformo por sentemigo kaj lernado de la svisromandaj dialektoj estas pozitiva paŝo al kuniĝo, la lingvaj kursoj estas konstruitaj laŭ sama progresiva strukturo, kio ebligas facilan komparon inter la variantoj, kaj kiu scias, eble foje ni okulumos al la translandlimaj samlingvanoj? Jen kial mi opinias, ke tiu platformo, facile alirebla al la ĝenerala publiko, estas ŝanco por la francprovenca kaj por la franĉkontea.

Tiu platformo volas esti ilo simpla kaj alloga por inviti al lernado de la romandaj dialektoj, sed ankaŭ por trovi informojn, vortojn, dokumentojn. Ĝi estu same utila al sciencistoj kiel al instruantoj aŭ al simpla scivolemulo. La strukturo de aostvala retejo dediĉita al la francprovenca kaj mastrumata de “*l’Assessorat des activités et biens culturels*”, tio estas de la edukaj kaj kulturaj instancoj (patoisvda.org), inspiris la romandan laborgrupon, kiu tamen donis dimension pli pedagogian al sia platformo, aldonante surretan instrudon.

La Platformo estos strukturita laŭ la sekvaj langetoj:

- **Kultura informo:** ĝi kunigos interalie historiajn, geografiajn, lingvistikajn aspektojn. Granda datumujo disponigos skribajn, parolajn kaj aŭdvidajn dokumentojn pritraktantaj la temon de la romandaj dialektoj laŭ larĝa difino.

• **Lernado kaj lingva sentemigo:**

- Lernado laŭ du niveloj: inico kaj enprofundiĝo.
- Lernejo: pedagogiaj dosieroj uzeblaj kun la lernantoj kaj informaj dosieroj por la instruistoj.
- Bibliografio: referencoj de universitataj studoj kun scienca rigardo.
- **Valorigo de la dialektoj:** tie ni trovos informojn pri diversaj eventoj (festoj, prelegoj ktp) kun ligoj al la retejoj de la dialektaj asocioj. En venonta etapo iu blogo ebliganta esprimiĝon al la diversaj agantoj povus esti planita.

Gravas precizigi, ke en ĉiu langeto troviĝos apartaj rubrikoj por ĉiu dialekto, kun la celo kunigi la fontojn respektante la specifecon de ĉiu dialekto.

Celita publiko de la Platformo

La Platformo estos malfermita al ĉiu publiko, kun aparta atento al la instruistoj kaj studentoj de ĉiuj niveloj, same kiel al lernantaj plenkreskuloj. La membroj de la regionaj pridialektaj societoj, korusoj, teatrotrupoj kaj junularo povos trovi sur la platformo partiturojn, teatraĵojn ktp. La Platformo povos interesi la parolantojn de la francprovenca kaj franĉkontea ankaŭ ekster Svislando.

Ligoj kun la kantonaj aŭ regionaj studplanoj kaj la ekzistantaj programoj de la kantonoj, de la Svisa Konfederacio aŭ de la Eŭropa Konsilio

La Konferenco Interkantona de la Publika Instruado de Svisa Romandio kaj Tiĉino (*Conférence intercantonale de l’instruction publique de la Suisse romande et du Tessin CIP*) inspiriĝas de la Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj, proponante lingvodidaktikon, kiu instigas malkovri lingvajn kaj komunikajn funkciojn ĝenerale. La

Platformo simile atentigas pri lingva diverseco.

Laŭ tiuj perspektivoj la didaktika programo “Atentigo kaj malfermo al la lingvoj en lernejo” (*Eveil et ouverture aux langues à l’école, EOLE*) aperis en Romanda Svislando en 2003 kun programo por la elementa lernejo³. Diversaj ekspertoj (dialektologoj, didaktikistoj, lingvistoj ktp) kreis kaj adaptis la agadojn de *EOLE*, kaj la programo aperis libroforme lige kun francprovencaj dialektoj de Svislando, Francio kaj Italio, same kiel en aliaj dialektoj de la ojla kaj oka areoj⁴. Tiuj lingvaj agadoj celas «malkovrigi al la lernantoj la lokan lingvan riĉecon hereditan de la historio, ĉefe el la gaŭla-latinida familio, kiu apartenas al la historio de niaj landoj kaj regionoj». Tiel la Interkantona platformo por sentemigo kaj lernado de la svisromandaj dialektoj plene kontribuas al tiu didaktika celo.

La unua etapo de la Platformo estos malfermita al la publiko ekde decembro 2025 kun komence nur tri moduloj por surreta instruado, sed la romandaj kulturaj instancoj jam planas novan etapon kaj por tio petas pluan financon subtenon de la Federacia Ofico pri Kulturo.

La diskonigo de la Platformo okazos tra la loka gazetaro okaze de oficiala inaŭgurado, ĝi estos aparte direkta al la instrua medio tra profesiaj gazetoj kaj en la daŭra trejnado de la instruistoj. Ĝi kompreneble ankaŭ aperos en la pridialektaj asocioj koncernataj. Plie kolokvo, kuniganta sciencistojn kaj dialektoparolantojn, estos organizita je la ekfunkcio de la Platformo. Tiel la dialektoparolanta medio ĝuos videblecon nekutiman, kiu gravas por la vivo de nia lingvo. ■

3. eole.irdp.ch/eole/

4. Daniel Elmiger, Jean-François de Pietro (dircs), *EOLE et patois. Éducation et ouverture aux langues patrimoniales, Neuchâtel, IRDP (avec la collaboration d’Elisabeth Berchtold, Federica Diémoz, Raphaël Maître, Aurélie Reusser-Elzingre et Sébastien Wüthrich)*, 2012.

Koncize el...

☛ **Kenjo – forpelo de la komunumo okieka el ĝia teritorio.** La okiekoj estas unu el la lastaj komunumoj de ĉasistoj-kolektistoj en Afriko. De pluraj jardekoj miloj da ili devas forlasi siajn vilaĝojn pro perforta agado de policistoj kaj arbargardistoj. La oficiala kialo estas protekto de la medio, argumento tute falsa: ankaŭ la arbaro rapide malaperas. Okiekoj nun devas lui domojn rande de urboj, ilia tradicia vivmaniero iĝas nur memoraro. Por diskonigi sian situacion, ili organizas kulturajn festivalojn kaj ceremoniojn. En 2007 kaj 2022 la Afrika Kortumo pri Homaj Rajtoj en Aruŝo pravigis ilian rajton plu okupi sian teritorion kaj postulis monkompenson fare de la kenja ŝtato sed, malgraŭ ĵusaj promesoj, nenio ĝis nun okazis. Kiel siaj antaŭuloj, la nuna prezidento de Kenjo, *William Ruto*, ŝajnas subteni tiun procezon de eksproprieto kaj forpelo, kiu ebligas grandskalan ekspluatadon de arbaroj kaj liberigon de terenoj. /AF

☛ **Alĝerio – kvin jaroj en karceroj por kontraŭ-tamazihita aktivulo.** La trian de julio la historiisto *Mohamed Amine Belghit* ricevis punon de kvin jaroj en karceroj pro deklaro en la emireja

televidkanalo *Sky News Arabia*, laŭ kiu “la tamazihta lingvo estas ideologia projekto el franca-cionisma kreado”. Sed de 2016 la tamazihta estas kunoficiala kun la araba kaj en 2017 la berbera novjaro (12^a aŭ 14^a de januaro laŭ la lokoj) iĝis nacia festo – ni rimarku, ke ĝi devenas de la romia julia kalendaro kaj do neniel rilatas al islamo. Tiu kondamno de arab-islama aktivulo estas fakte nova fenomeno, kiu montras la forton de la tamazihta movado, nun bone akceptita de multaj alĝerianoj. La eterne reganta partio, kiu tre longe apogis la doktrinon pri nura arab-islameco de Alĝerio, devis mildigi sian pozicion. Tial la juĝistoj kondamnis la historiiston pro “atako al la simboloj de la nacio”. Liaj sufiĉe multaj kolegoj en la alĝera universitato, kiuj subtenis lin antaŭ la proceso, apelaĉante al la prezidento mem, certe komprenis, ke vento povas ŝanĝi direkton eĉ en la plej striktaj diktaturoj. /AF

☛ **Francio – ne atendita subteno al forta malcentriĝo.** Opiniondado realigita de la instituto *IFOP* dum lasta julio en regionoj kun forta identeco ŝajnas montri, ke loĝantoj de tiuj regionoj ŝatus eliri el la jakobena (tio estas

tre centrigita) politika sistemo, kiu forte karakterizas Francion de jardekoj, se ne diri jarcentoj. Tiel 2000 homoj estis pridemanditaj. Temas pri loĝantoj de Alzaco-Mozelo, Bretonio, Eŭskio, Katalunio, Korsiko, Okcitanio kaj Savojo. Jen la respondoj “tre favoraj” kaj “sufiĉe favoraj” ricevita al la demandoj – ĉiuj kune, sed ne estas tiom grandaj diferencoj inter la regionoj.

- Organizo de referendumoj pri lokaj problemoj: 35 kaj 52, sume 87%.
- Regiona adapto de ŝtataj leĝoj: 20 kaj 53, sume 73%.
- Federigo de Francio, kun fortaj regionaj povoj: 21 kaj 50, sume 71%.
- Redimensiigo de la grandaj regionoj de 2015: 18 kaj 50, sume 68%.
- Aŭtonomia statuto por iuj regionoj: 14 kaj 41, sume 55%.

Multaj ekster Francio emos ridi pri tiuj rezultoj: en diversaj landoj tiuj punktoj ja estas de tre longe realigitaj kaj do havas lokon en la normala funkciado de politiko kaj administracio. Kaj ĉu la demandoj estis bone vortumitaj? Ekzemple la punktoj tri kaj kvin tre proksimas: federigo implicas aŭtonomion, la respondoj devus do esti pli malpli la samaj. Sed la homoj, kiuj konceptis la enketon, same kiel la pridemanditoj, certe ne havas profundajn politikajn konojn pri temo, kiu iel emas resti tabua. Ni tamen aldonu, ke samtipaj opiniondadoj dum la lastaj jardekoj donis rezultojn multe malpli favorajn al malcentrigado.

Entute tre eblas, ke samaj rezultoj okazu en aliaj regionoj, kiujn oni kutime konsideras regionoj kun malpli forta identeco. Ofte problemoj pli bone solviĝas je kiel eble plej loka nivelo (principo de subsidiareco). Oni rimarkas, ke neniu kultura demando estis farita: instrui ne nur “nacion” historion kaj kunoficialigi aliajn lingvojn ankoraŭ ne povas trovi lokon sur la politika agendo de la eterne glora Francio. /AF

LA RETBUTIKO DE KEA

Trovu librojn, revuojn, diskojn kaj aliajn varojn kaj servojn proponataj de Kataluna Esperanto-Asocio

<https://butik.esperanto.cat>

Dum 2025,
profitu 5%-an rabaton
en ĉiuj varoj
per kupon-kodo
ETNISMO25

ESPERANTO*
CAT

*Associació Catalana d'Esperanto/Kataluna Esperanto-Asocio



Ĝenerala Asembleo de Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj en Brno, la 1an de aŭgusto de 2025

1/ Akcepto de la membroj

Vendredon la 1an de aŭgusto, je la 10.00 komenciĝis en la salono *Urbanová* de la konstruaĵo Q, ene de la *Mendel*-Universitato la malferma kunsido de IKEL, kun ĉeesto de ĉirkaŭ 24 partoprenantoj, el kiuj 4 membroj de nia etnisma asocio.

Tiu asembleo estis malfermita al ĉiuj partoprenantoj de la UK, sed kompreneble nur membroj de IKEL rajtis debati kaj voĉdoni.

Nia kasisto *Xabier Rico Iturriotz* gvidis la diskutojn.

2/ Agada raporto (somero 2023 - somero 2025)

Kiel kutime nia ĉefa agado estis la publikigado kaj dissendado de nia revuo *Etnismo*, kiu aperis regule. *Nicole Margot* plu redaktis ĝin kunlabore kun *Ferriol Macip i Bonet*. Ni nun estas redaktantaj la n-ro 115, kiu, aperinte kun malfruo, povas jam prezenti informojn pri nia agado en *Brno*.

IKEL en la sociaj retoj

La Fejsbuk-paĝo de IKEL restis silenta dum la lasta jaro, dum pli aktivis la Telegrama kanalo. En ĝi, jam komence de la jaro 2024, en aprilo, *Ferri* (*Ferriol Macip i Bonet*) informis pri la eniro de amazonia verkisto, *Ailton Krenak*, en la Beletan Akademion de Brazilo. Aperis intervjuo de *Seán Ó Rian* el la jutuba kanalo Esperanto-Kulturo (ESKU), pri lia diplomata kariero kaj lia frua interesiĝo pri endanĝerigitaj lingvoj, komenciĝanta per la lernado kun la patrino de la irlanda lingvo, dum ĝi preskaŭ

malaperis sude de Irlando. El Libera Folio oni sciis pri la plua malsukceso oficialigi en EU tri regionajn lingvojn de Hispanio, la katalunan, la eŭskan kaj la galegan, laŭ artikolo verkita de *Nicolau Dols*. Iu raportis pri artikolo de *Global Voices* pri furorkanto en la baŝkira lingvo, de la baŝkira bando *Ay Vola*. Tamen iuj kritikis la ĉefan kantistinon de tiu grupo, *Adel Ŝajhitdinova*, pro ŝia rusa akĉento. Plej laste oni havis novaĵojn pri esperanto-aktivuloj en Tatario, kiuj invitas siajn samlingvanojn lerni Esperanton kaj nin ĉiujn malkovri la la historion de la Esperanto-aktivado en Tatario dum la Sovetia periodo: *Fatix Ĉamirxan* [proksimuma prononco: *Fatiĥ Amirhan*], tataria verkisto de la 20-jarcentiĝo, parolis Esperanton. En la 90aj jaroj TEJO havis vicprezidanton kun finntatara patro *Sabira Ståhlberg*.

Okazis prezentoj de IKEL kaj *Etnismo* dum la Kataluna Kongreso meze de 2024 en la urbo *Vic* kaj en la Hispana kongreso en *Soria* en majo de 2025.

La raporto estis unuanime akceptita.

3/ Financa raporto

La dokumentoj pretigitaj de nia kasisto *Xabier Rico Iturriotz* jam estis senditaj al ĉiuj membroj. Tie ĉi ni ne reproduktos la tabelojn, reprenante nur la komentojn de nia kasisto.

Komentoj pri la bilanco de 2023

La kredita saldo fine de 2023, tio estas 5583,93 €, kompare al tiu de la fino de 2022 pliĝas je 816,48 €.

Kiel en la pasinta jaro ni sukcesis je la pago de kotizoj. Okazis la UK en Torino. Nia budo estis sufiĉe sukcesa. Ni

bone vendis, kaj kelkaj homoj aliĝis al IKEL. Krome ni ricevis kelkajn gravajn donacojn, ne nur dum la UK.

La elspezoj estis pasintjare pli grandaj, ĉefe pro la plialtiĝo de la kostoj de la presado.

La preskosto de de la numero 112 estis pagita komence de la jaro 2024.

La nombro de IKELanoj fine de 2023 estis 64 homoj.

Komentoj pri la bilanco de 2024

la kredita saldo fine de 2024, 5586,68 €, kompare al tiu de la fino de 2023, pliĝas je 2,75 €.

Kial la enspezoj estis preskaŭ duoblaj en 2023 kompare al tiuj de 2024? Ĉar en 2023 ni atingis la pagon de pluraj nepagitaj kotizoj de antaŭaj jaroj.

En 2024 ni ne ĉeestis la UKon, kaj pro tio la vendoj kaj la donacoj ne estis tiel grandaj kiel en 2023.

La nombro de IKELanoj fine de 2024 estis, kiel pasintjare, 64 homoj.

La granda plejmulto de la ikelanoj akurate pagis la kotizojn.

Mi esperas, ke kelkaj homoj, kiuj havas iun ŝuldon, aranĝos tion dum la UK en *Brno*.

Aldonaj komentoj

La kredita saldo de la konto de IKEL ĉe UEA estis fine de junio de 2025: 6340,38 €.

Defioj: Plialtigi la kvanton de IKELanoj. Kiel? Interalie per nia agado en la sociaj retoj, plibonigante tion kion ni kutime faras. Tamen mi opinias, ke ni devas pridiskuti tion kaj lerni de homoj, kiuj fakas pri tio.

Alvenas nova epoko de IKEL kaj la defioj estas grandaj...

La financa raporto estis unuanime akceptita.

4/ Elekto de nova estraro

Alain Favre, Nicole Margot kaj Hector Alós i Font forlasis sian postenon ene de la estraro.

Rafael Blanco Arbe prezentis sian kandidatecon por esti prezidanto, kaj kun tri favoraj voĉdonoj kaj unu sindeteno li estis elektita kiel nova prezidanto de IKEL.

5/ Projektoj kaj perspektivoj

Rafael Blanco Arbe diris, ke li ankoraŭ ne havas klaran gvidlinion por la agado en la asocio, unue li turnos sin per e-poŝto al la membroj de la asocio, kaj informos pri sia elekto kaj vokos la asociojn al aktiva kunlaboro en IKEL kaj al partopreno de novaj personoj en la estaro. Li komentis ankaŭ, ke li ŝatus starigi aŭ plifortigi rilatojn kun asocioj, kiuj agadas en la defendo de la malpliiĝitaj lingvoj kaj kulturoj. Tiusence *István Ertl* sciigis, ke li pretas daŭrigi sian taskon en la estraro rilate la reviziadon de la tekstoj eldonotaj en **Etnismo**, kaj la tenadon de rilatoj kun la Esperanta-gazetaro.

Iom antaŭ la fino, partoprenanto demandis kiel konkrete oni povas agadi por favori la disvolviĝon de la minacataj lingvoj. *Rafael Blanco Arbe* respondis, ke ne estas klara aŭ ĝenerala propono por solvi tiun problemon. Li menciis, ke ekzistas kelkaj pozitivaj spertoj, kiel la disvolviĝo de la inuita en Gronlando dum la lastaj jardekoj, sed ke ĉiuokaze estas pluraj spertoj kaj agadoj, kaj kelkaj iĝas sukcesaj, sed aliaj ne.

Je la 10h 40 finiĝis la ĝenerala asembleo. / *Xabier Rico Iturriotz*

Adiaŭaj vortoj de la redaktoro

Tiu ĉi numero de **Etnismo** ja komenciĝas kaj finiĝas per adiaŭaj aŭ salutaj vortoj. Ĉi-jare IKEL travivas gravan transiran momenton, certe necesan por ne stagni en rutiniĝo kaj reviviĝi per novaj fortoj kaj novaj ideoj.

Antaŭ 22 jaroj, en 2003, mi deprenis la redaktadon de **Etnismo** el la manoj de *Uwe Moritz* sen ajna sperto pri redaktado kaj pri komputila enpaĝigo. La tiama verkilo de mia komputilo ne kongruis kun tiu de *Llibert Puig* (kataluno, kunfondinto de IKEL), kiu tiam presigis la numerojn de **Etnismo** en Katalunio. Mi ne plu memoras kiel ni solvis la problemojn, sed mi memoras, ke mi ofte sentis min malesperige superŝutita de la tasko. Iu numero aperis eĉ komplete fuŝita, ĉar mi ankoraŭ ne konsciis, ke ne eblas sendi enpaĝigitajn paĝojn kun fotoj sen konverti ĝin de Word al Pdf.

Sed venis helpoj, *István Ertl* eniris la estraron kaj bonvene reviziis la artikolojn, *Alain Favre*, alpreninte la prezidantecon, pli kaj pli helpis, verkante la eldonistan leteron, koncizaĵojn kaj artikolojn. Tutlaste *Ferriol Macip i Bonet* komencis profesie enpaĝigi la revuon. La "mention" mi iom post iom lernis kaj pli kaj pli ĝin ĝuis. Malgraŭ la helpoj la tasko okupas tempon. Ricevi artikolojn, ilin

foje adapti, verki iujn, enŝovi la unuajn proponitajn korektojn, rekontroli post la enpaĝigo kun la helpo de *Nancy Fontannaz*, kaj adapti mapojn al Esperanto. Mi multon lernis kaj aprezis la paciencon de *István*, kiu korektadas erarojn tro ofte ripetitajn. Ĉu vere Esperanto facilas? Mi ofte demandas min, sed almenaŭ ĝia logiko devigas nin al precizo. Pri tio mi multon lernis de *István*, eble ne sufiĉe!! Sed la revuo plaĉas al kutimaj legantoj same kiel al tiuj, kiuj ĝin malkovras, kaj iliaj laŭdoj ege kuraĝigis. Mi dankas ĉiujn kunlaborantojn jam cititajn, al kiuj mi aldonas *Xabier Rico Iturrioz*, kiu fidele presigas la revuon, kaj *Natxo Marixa Apaolaza Baños*, kiu ĝin dissendas, kaj ĉiujn kontribuintojn al la revuo. Mi kuraĝigas tiujn lastajn plu sendi artikolojn al la nova teamo, la revuo bezonas aŭtoran diversecon.

Eĉ se mi forlasas la estraron, mi plu sentos min koncernata de IKEL kaj **Etnismo**. Certe ja! Gravus, ke la redaktado de la revuo daŭru sen tro da obstakloj por la nova redaktoro/ino, kaj se li/ŝi/ili bezonas helpon, mi pretas respondi. Kaj, konante la malfacilon ricevi artikolojn, mi volonte sendos iujn. Ple nan sukceson mi deziras al la venonta **Etnismo**, kiu devus aperi jam fine de la nuna jaro. / *Nicole Margot*



Eblas reklami en Etnismo!

- Anonctarifo: (EUR): 1 p. 80, 1/2 p. 45, 1/4 p. 25, 1/6 p. 15.
- Rabato por IKEL-membroj: 10 %.

Salutvortoj de la nova prezidanto

Estimataj membroj de IKEL kaj legantoj de ĉi revuo! Jen *Rafael Blanco Arbe*, nova prezidanto de IKEL; mi naskiĝis en 1963 en *Pamplona-Iruñea*, *Nafara* Aŭtonoma Komunumo, Eŭskio (Hispana Ŝtato). Mi eklernis Esperanton en 1984 kaj de tiam pli aŭ malpli aktive mi agadis kaj agadas en la esperanta movado.

Profesie, ĝis mia emeritiĝo mi estis instruisto en mezlernejo pri la eŭskaj lingvoj kaj literaturo. Krome mi agadas delonge en asocioj kiuj strebas por la disvolviĝo de eŭsklingvaj komunikiloj, pere de radioelsendoj aŭ revuoj.

Ekde la studtempo en universitato vekigis ĉe mi intereso pri la malpliigitaj lingvoj kaj kulturoj – la eŭska ja apartenas al tiu grupo de minacataj lingvoj –, kaj iom post iom trafis min, de la plej proksimaj al ege foraj lingvoj, novaĵoj pri la okcitana, galega, korsika, frisa, tamazirta, kimra, samea, inuita, ajmara aŭ maoria, inter multaj aliaj.

Kiam mi eksciis ke en la Esperanta medio ekzistas asocio pledanta por la subteno de tiuj lingvoj kaj kulturoj, mia intereso nature des pli pligrandiĝis. Mi havis la ŝancon konatiĝi persone kun *Uwe Joachim Moritz*, kies personeco kaj viglo impresis min pro lia klara ideo pri la grava rolo de malgrandaj kulturoj en la estonteco de la homaro. Sinjoro *Moritz* forpasis en marto de 2024, kaj mi profitas ĉi tiujn liniojn por rekone danki al li, fondinto de la asocio kaj la revuo, pro lia sindediĉa laboro en la defendo de bunte lingva mondo.

Elkoran dankon, *Uwe!*

Mi volas rekoni ankaŭ la agadon de *Nicole Margot* kaj *Alain Favre*, gvidantoj de IKEL kaj *Etnismo* tra la lastaj du jardekoj; danke al



ilia senĉesa agado la asocio kaj revuo plu havas meritan lokon ene de la Esperanta kulturo, kaj Esperanto plu havas spacon en la subteno de malpliigitaj lingvoj.

Nun, tiu kiu tajpas tiun tekston, estas nova prezidanto post kandidatiĝo en la kunsido de *Brno*. Ankoraŭ mi ne havas klarajn gvidliniojn por la venonta jaro. Komence mi celas daŭrigi la celojn de la lastaj jaroj strebante diskonigi la ekziston kaj agadon

de IKEL ene de la esperanta movado kaj disvastigi la laboron de IKEL ene de neesperantistaj asocioj kiuj favoras la disvolviĝon de minacataj lingvoj. Memkompreneble mi kalkulas kun viaj kunlaboro, opinioj, proponoj... Ni pledu por la internacia solidareco tial ke, kiel franca esperantistino kiu lernas la eŭskan, diris al mi: «la lingvoj malsamas, sed temas pri la sama lukto».

Ĝis! / *Rafael Blanco Arbe*

Rafael Blanco Arbe kaj Xabi Rico Iturriotz en Brno.

Fariĝu membro de IKEL



Valorigu la liberecon kaj la diversecon,
aliĝu al la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj
kaj ricevu **Etnismon** senpage



www.etnismo.org